



## **“MEMORAĴON MI LASIS EN LA Batalo de Kobano: Okulon”**

### **Xerin Kobane. Eksmilicano de la IPT(1)**

**Kobane ekbatalis kontraŭ la Islama Ŝtato “sen milita trejnado”, en la kantono de Ĝiziro. Tamen, iom pli poste, la milito atingis ŝian hejmon, la urbon Kobano. “Ni estis certaj, ke ni mortos.”**

Xerin Kobane batalis kontraŭ la Islama Ŝtato defendante sian naskiĝurbon, kaj grandan oferon ŝi faris tiam. Ŝi memorigas la travivaĵojn dum tiuj teruraj monatoj.

#### **Kia estis via vivo antaŭ la batalo de Kobano?**

En 2011 mi estis liceano, kiam komencis la milito. En tutan Sirion disvastiĝis la minaco de la Fronto de la Venko(2). Mi ne sekvis la unuan alvokon al kuniĝo por memdefendo, ĉar mi estis lernanta, sed tuj kiam mi fariĝis 18-jara, mi iris al la kantono de Ĝiziro kune kun du virinoj de Kobano. La Fronto de la Venko atakis la regionon, kaj ni aliĝis al la Konfederacio de Lernantoj de Roĵavo. Mi estis en la milito dum tri monatoj sen ia ajn milita trejnado. Kiam la batalo kvietiĝis mi revenis, en Kobanon kaj eklernis denove. Ankaŭ mi helpis la lernantojn, kiuj estis ekstere. Tamen, post kvar monatoj, la Islama Ŝtato komencis ataki la vilaĝetojn de la kantono de Kobano.

#### **Kia situacio estiĝis?**

La Islama Ŝtato proksimiĝis el oriento kaj okupaciis vilaĝetojn. La homoj fuĝis al la urbo. Poste, la IŜ komencis kapti la vilaĝetojn kuŝantajn okcidente de la rivero Eŭfrato. Pli kaj pli da homoj koncentriĝis en Kobano, kaj la malfacilaĵoj multobliĝis, pri la nutraĵoj, ekzemple. La familioj amasiĝis en la keloj. Fine, alvenis la batalo. Ni aŭdis la eksplodojn, kaj tiam ni sciis, ke ili detruos la urbon.

### **Kia estis la reago de la loĝantoj?**

Kelkaj memmortigis sin por ne esti kaptitaj de la IŜ, ĉar la torturo kaj murdo estis kutimaj por la kaptitoj. La iomon da nutraĵo, kiu restis en la urbo, oni donis al tiuj, kiuj transpasis la landlimon kun Turkio. La IŜ atakis kaj pafis kontraŭ la homoj, kiuj fuĝis, kaj mi flegis vunditojn dum tri monatoj en provizora hospitalo starigita en Turkio, sed mi ne povis elteni, kaj mi revenis en Kobanon. La urbo estis detruita.

### **Ĉu vi reiris por batali?**

Jes, tri tagojn poste mi iris al la fronto, ĉar mi havas multajn geamikojn en la PPT. En tiu tempo ne estis granda ekipaĵo, kaj ĉio ege malfacilis. Ne estis nutraĵo nek lavakvo, kaj pene ni akiris trinkakvon. Ni ne posedis milituniformojn, kaj ni devis batali en civilvestoj. Dum monato kaj duono mi postenis en la 48-a strato, kaj poste mi lokiĝis en alia kvartalo, en la strato Alepo. La batalo krutis tie, kaj ĉie estis minoj. Multaj batalantoj mortis pro ili.

### **Kiel vi fartis tie?**

Psike tio estis tre kruela; mi vidis morti multajn geamikojn. Antaŭ la liberigo de Kobano, mi moviĝis de unu taĉmento al alia. Mi uzis BKC-mitralon, kaj oni faris min rotestro. Iomete antaŭ ol la koalicio komencis la bombadojn, en Kobano restis 100 milicianoj. La IŜ kontrolis la 85 % el la urbo, kaj ni certis, ke oni mortigos nin. Tamen, ni restis tie, ĉar ni volis, eĉ se ni havis la eblecon fuĝi. Danke al tiu penso, ni kundividis la ioman da manĝaĵo kaj akvo, kiun ni disponis. En tiu batalo, la plejmulto el ni estis el Kobano, kaj ni ne havis militan trejnadon. Fakte, ni estis volontuloj de la PPT kaj IPT. Mi perdis kvar kamaradojn de mia roto. Post tio, mi translokiĝis al alia.

### **Ĉu vi daŭrigis batalante post la liberigo de Kobano?**

Jes, ni komencis kampanjon por liberigi ankaŭ la vilaĝojn. Estis multaj minoj, kaj ne facilis iri de unu loko al alia. Mi aliĝis al taĉmento partopreninta en la bataloj de Hesiĉo(4) kaj Serekaniĵo(5). Ni havis militan sperton kaj ege avancis. Ni liberigis amason da vilaĝoj, kaj iom post iom venkis la IŜ-n. Tamen, la IŜ fiuzis la civilulojn kiel ŝildon. Kiam la trupunuoj de la PPT kaj IPT alproksimiĝis, ili miksiĝis kun la civiluloj kaj faris suikidajn atakojn per eksplodzonoj. Tiel mortis du miaj kamaradoj.

### **Vi suferis gravajn vundojn en tiu fronto.**

Jes, en la vilaĝeto *Jaada*. Ni kaptis ĝin senreziste. Ni parolis kun la loĝantoj, kaj ni traserĉis la lokon serĉante IŜ-anojn. Neniun ni trovis. Je la 8-a matene ili atakis nin. La lukto estis kruta, ĉar la tieaj araboj helpis la IŜ-on en la embusko. Ili lasis nin eniri, por nin ataki. Ni estis dekdu en la grupo, kaj ok mortis. Mi estis en montpinto por observi la situacion en la vilaĝo. Subite, okazis eksplodo, kaj mi perdis la konscion. Tiam mi nenion sentis; mia kapo malsekis kaj el unu okulo mi ne vidis. Tiujn, kiuj ne mortis pro la eksplodo, mortigis la snajperoj. Mian kamaradon, la muniziprovizanton de la BKC-mitralo, oni vundis en la kapo, kaj li havas grandegajn problemojn; li perdis la memoron. La PPT neniam perdis tiom da batalantoj dum unu nura batalo.



### **Kiel vi eliris el tie?**

Pliaj kamaradoj alvenis helpi nin. En mia kazo, mi ricevis la unuan sukuradon, kaj, ĉar oni nenion plian povis fari, oni min ambulance forportis al turka hospitalo en Riho(6), ĉar mi bezonis kirurgion. Mi bezonis kvar operaciojn. Komence, mi ne sciis, ke mi perdis la okulon, ĝis kiam kuracisto diris al mi, ke oni devas komuniki ion gravan al mi. Oni forprenis de mi la pansaĵon, kaj en spegulo mi vidis, ke mankis al mi okulo. La kuracisto demandis al mi, kial mi ridetis. Mi respondis, ke mi lasis memoraĵon en la batalo de Kobano: okulon. Partoprenonte en la batalo de Kobano mi agnoskis, ke mi perdos mian vivon aŭ korpoparton. Oni metis al mi vitran okulon, kaj nun mi estas pli bela ol antaŭe [ridoj]. La spertitaĵo el la batalo de Kobano estis tre kruta, kaj tio transformis min.

### **Kian influon havis tio sur vi?**

Mi ne pentas; motivita kaj kun fido mi batalis. Multaj demandas al mi, kial mi ne restis en Kobano post la liberigo. Mia konscienco ne povis toleri la IŜ-on; la tutan mondon mi volas liberigi, ne nur la kurdojn. Bedaŭrinde, la homoj de Jaada ne komprenis tion, kaj ili helpis la IŜ-on kontraŭ ni. Nun, mi laboras en la memadministrado, en la sistemo starigita de la kurdoj, kaj ni estas rekonstruantaj la urbon. Mi ne restas hejme. Kobano pluvivas, kaj mi ĝojas.

Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj).

- (1) Inaaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Jine).
- (2) Cizîr.
- (3) Jabhat al-Nusra, en la araba.
- (4) Hesîçe.
- (5) Serê Kaniyê.
- (6) Riha. Urfa, en la turka.

### **KLARIGOJ:**

Aŭtoro: Aitor Aspuru.

(\*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 4-an de Septembro 2018-a.

Tradukis: NXC. Novembro 2018-a. Provlegis: DS.

